

LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE
MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

Papo Benedikto XV-a. Preĝo por la Paco. — V. Fulgurator. Imperialismo kaj Milito. — M. Konopnicka-Jozef Bociek. La Sorto de Stach. — El la Tuta Mondo (Interdu Kulturoj. — Kiel en Sovetujo la Infanoj estas Venenigataj per Militarismo. — Vortoj de Episkopo. — «Kulturmalsaĝaĵoj de la Okcidento». — Pripensindaj Nombroj. — Kiom Kostis la Granda Milito? — Leviganta Afriko. — Protestanta Junularo por Malarmado. — La Nuntempa Junularo Bezonas Esperanton. — Pli Grandan Seriozecon en la Katolika Esperanto-Movado! — El la Katolika Paca Movado. — Gravaj Internaciaj Kongresoj kaj Kunvenoj 1931. — Nia Movado. — Leterkesto. — El la Esperanto-Movado. — Sur Nia Librotablo.

REDAKCIO : Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 53, Germ. (Regina Reiff).

Abonprezoj de "La Juna Batalanto"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	2 s	3 s	1 s 3 d	Hungarujo	2,4 p	4 p	2 p
Argentino	1,50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	2 s	3 s	1 s 3 d	Japanujo	2 s	3 s	1 s 3 d
Aŭstralio	2 s	3 s	1 s 3 d	Jugoslaviujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 s	Litovio	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Ĉeĥoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4zl	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50 dr	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	3 p	4,50 p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtена kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

Abonejoj : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

Poŝtkontoj. Germanujo : Köln 480 37 (Wilh. Solzbacher, Köln) ; Francujo : Strasbourg 3180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine) ; Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer).

POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvaj. Ili devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝo, por disdoni aŭ disvendi ilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. Jara abonprezo : 1,20 RM. Propagandcele (sed oni tiam nur forsendas minimume 25 ekz.) ĝi kostas po ekzemplero **nur 3 fenigojn!** Eldonejo : Verlag Erwachende Jugend, Werl (Kr. Soest), Germ.

« **LA JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » estas destinata por niaj **francilingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** por 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj!

En angla kaj hispana lingvoj similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.

Preĝo por la Paco

De Papo Benedikto XV-a.

Timigite per la batajado kaj ĵaluzeco, kiuj ruinigas popolojn kaj naciojn, ni turnas nin, ho Jesuo, al via plej amanta koro kiel nia sola espero. Ho Dio de la Mizerikordo, kun larmoj ni vokas al vi, por ke vi finigu la militojn kaj la teruron de la milito. Ho Reĝo de la Paco, ĥumile ni petas la pacon, kiun ni sopiras.

El via Sankta Koro vi elverŝis super la mondon ĉian amon, por ke malkonkordo finiĝu kaj amo sola regu inter la homoj. Dum via vivo surtera via koro frapis kun amanta kompato por la zorgoj de la homoj. Hodiaŭ, kiam tiel ofte regas la malamo, denove via dia koro estu tuŝata per kompato!

Plenigu regantojn kaj popolojn per la spirito de la mildeco! Kuracu la malkonkordon, kiu disŝiras la naciojn! Vi, kiu elverŝis vian valoran sangon, por ke ili vivu kiel fratoj, denove kunigu la homojn en ama harmonio! Al la knio de la Apostolo Petro : « Savu nin, Sinjoro, ĉar ni pereas, » vi respondis vortojn de la graco kaj trankviligis la furiozajn ondojn. Bonvolu nun aŭskulti niajn fidemajn preĝojn, kaj redonu al la mondo ordon kaj pacon!

Kaj vi, Plej Sankta Virgulino Mario, kiel en aliaj tempoj de mizero, tiel estu ankaŭ nun nia helpo, nia protekto kaj nia ganto! Amen.

Imperialismo kaj Milito

Pensoj de juna ĥina katoliko.

De V. FULGURATOR.

La imperialismo estas granda demono, kiu ofte konfuzis la pacon de la mondo kaj mortigis la homajn rasojn. Ni ne bezonas serĉi malproksime la pruvon: ni ja memoras pri la Granda Milito ankoraŭ tre proksima. Kiom da patroj, fratoj, maljunuloj kaj junuloj ĝi forbuĉis! Kiom da vilaĝoj ĝi detruis! Kiom da milionoj kaj miliardoj estas elspezitaj, por alporti tiom da doloroj al la familioj kaj fluigi tiom da sango! Ĉu ne la imperialismo kondukis al la milito la naciojn, la imperialismo, la terura demono serĉanta trinki la sangon de la homoj?

Ĉiuj grandaj nacioj de la mondo, kvankam ili tre inteligente kaj civilize eltrovis ĉiuspacajn instrumentojn, por esplori la nevideblan mondon, ne ĉiam bone ekkonis tiun kruelan realecon. La poetoj kantis pri ĝi: kan-

toj, poemoj, romanoj laŭdas ĝian gloron. La maljunaj avinoj rakontas ĉe la fajrejo interesajn historiojn aŭ legendojn pri la milito; la infanoj aŭskultas lerneme, kaj poste junuloj kaj maljunuloj heroe mortos sur la batalkampoj. Tiel povas ĉe la grandaj nacioj de la Okcidento naskiĝi la imperialismo.

Ni parolu nun pri la Oriento: Kiun rolon ludis la imperialismo en la ĥina pensado? Mi povas sincere diri al vi, karaj gelegantoj, ke ĝi jam de jarcentoj en Ĥinujo estas estingita: ĝi estis nekonata inter ni ĥinoj, depost kiam Konfucio (552-479 a. Kr.) kaj Laotse (570-490 a. Kr.) penetrigis en ĉiujn ĥinajn spiritojn la ideon de la Paco. La dua estis pesimista naturisto, la unua pozitivistika konvenciemulo, sed malgraŭ iliaj malsamaj teorioj ili ambaŭ havis la saman celon — doni la pacon al la mondo.

Alia granda filozofisto Meitse, same pozitivistika kiel Konfucio, puŝis la demandon pli malproksimen. Li predikis la Universalan Amon kaj malamis la militon; pri tio jen malgranda rakonto pruvanta lian spiriton.

Unu tagon la princo de Tsou, volante ataki la princlandon Songs, ordonis al famkonata inĝeniero Kon-Chou-Pan, konstrui aparatojn nome Yun-Tsi, t. e. altan mekanikan ŝtupetaron uzatan en la armeo por supreniri sur la murojn de malamikaj urboj. Aŭdinte tion, Meitse faris seninterrompan vojaĝon de dek tagoj kaj dek noktoj, por persvadi la inĝenieron, ke li ne faru tiujn mortiginstrumentojn. Li fine alvenis kaj sukcesis konvinki lin pri sia doktrino. Jen resumo de parto el lia libro titolita « Kontraŭ la milito »:

« Steli fruktojn el najbara ĝardeno! estas krimo, devas esti punata; rabi hundojn, kokinojn kaj kokidojn de fremduloj! la krimo estas jam pli granda, devas esti punata: forpreni ĉevalojn kaj bovojn de la kamparanoj! estas krimo jam pli grava, devas esti punata; mortigi senkulpulon kaj forrabi de li mantelon kaj glavon! estas krimo jam pli grava, devas esti punata. Pri ĉio, kion ni citis, ĉiu homo scias, ke tio estas krimo, kaj ke oni devas puni la kulpulojn pli aŭ malpli severe laŭ tio, kion ili faris. Sed rabi tutan landon kaj mortigi milojn da homoj, eĉ la saĝuloj konsideras tion permesita kaj kantas pri ĝi, dirante: « Justeco... ktp. » Ve, ve! ... »

Tiel tiuj tri grandaj majstroj, fondintoj de tri specoj de la pacifismo, per sia grandega influo faris la ĥinan popolon la plej pacifista en la mondo. Sed kelkaj eŭropaj amikoj, kiuj povus dubi pri miaj vortoj, eble demandos, ĉu la junaj ĥinoj de hodiaŭ ne estas imperialistaj?

Al tiu demando mi respondos, ke malgraŭ la malbonaj teorioj venintaj el la Okcidento, malgraŭ la grandegaj maljustaĵoj faritaj al Ĥinujo per la fremda imperialismo (opio-milito, neegalaj kontraktoj, koncesioj ktp.) la juna Ĥinujo ne estas imperialista, se ni per tiu vorto komprenas la deziron aŭ la fakton, fari militon al fremdaj landoj, por ilin subigi aŭ posedi. Kaj tio denove estas pruvo de la ĥina paca spirito.

Sed sekve de la konduto de la fremduloj al Ĥinujo, la juna Ĥinujo konsciigis pri siaj rajtoj; ĝi ne volas la malbonon de la fremduloj, sed ĝi ankaŭ ne volas, ke la fremduloj faru malbonon al ĝi. Kaj kiu povus ĝin riproĉi pro tio?

Trad. el « Jeunesse Chinoise », Louvain.

BONVOLU NE FORGESI, ke per ĉi tiu numero finiĝas la 5-a jarkolekto de La Juna Batalanto. Ni petas niajn abonantojn, ke ili ŝparu al ni laboron, kostojn kaj zorgojn, sendante tuj sian abonprezon per la nova jaro.

LA SORTO DE STACH

De M. Konopnicka, el pola lingvo trad. Jozef Bociek.

Stach (Stah) — pola mallongigo de la nomo Stanisław.

Se militon reĝ' veturis.

/latdeziroj al li kuris;

Bruis flagoj gajajn kantojn,

Ke li venku kontraŭantojn.

Se Stah' iris al bataloj,

Bruis al li cerealoj,

Adiaŭis lin la spikoj,

Familio kaj amikoj.

En milito sagoj bruas.

De soldatoj sango fluas.

Piej heroe reĝ' batalas,

La simpiuloj pleje falas.

Flirtas flagoj post batalo,

Ho! la sorto vilaĝana,

Stah' mortvunda hospitalon —,

Reĝ' revenis urbon sana!

Se enrajdis reĝ' kastelon,

Atinginte sian celon, —

Sonoriloj al li sonis,

Reĝan Moston fanfaronis.

Stahon oni metis kavon...

De vund' kreskis ruĝpapavo...

Ploris orfoj, arboj bruas,

De vidvino larmoj fluas...

INTER DU KULTUROJ

La gazeto « Chung Hwa Hui Tsa Chih », organo de la Ĥina Asocio en Nederlando, publikigis en la decembra numero 1930 interesan artikolon pri la pensado de la ĥina klera junularo en Nederlanda Orienta Ĥindujo pri la eŭropa kulturo tie tuŝanta la indonezian kulturon. « Antaŭ pli intima kontakto kun la okcidenta kulturo — skribas Lou Pinh Kian — ĝi aperas al niaj junaj studentoj kiel miraklo. Poste dividigas iliaj penosj en admiro al la moderna progreso kaj malamo al la eŭropanoj, al kiuj ili kredas sin malsuperaj. Tamen la ĉiutaga interrilatado kun blankuloj baldaŭ estigas ŝanĝon en ilia opinio: ili vidas, ke ankaŭ la vivo de la blankuloj pasas banale. Nun ili kredas sin mem superaj kaj malestimas la eŭropan civilizon. La plej multaj el niaj studentoj restas starantaj je tiu ekono kaj ne venas pli supren ol ĝis la ŝtupo de supra naciismo. Ili estas la tipaj estontaj malgrandburgoj. Malofte la plua ŝtupo estas atingata, kiu distingigas per interna tralaborado de la koaliktaj estigintaj el la kontrasto de du kulturoj. Por atingi tion, oni devas kompreni la propran kulturon ĝis ĝiaj profundoj, sed ankaŭ penetri la fremdan, okcidentan kulturon kaj alproprigi al si la verajn valorojn el ambaŭ. Nur kiu tion povas, apartenas al tiuj plensignifaj viroj, kiuj ne toleros simplan komandadon de la okcidento al la oriento. De ili venos la reala daŭra influo. »

En la saman konflikton venas ankaŭ la indonezia junularo, kiu staras inter la influoj de la eŭropa kaj de la ĥina kulturo. Pri tio skribas Lie Sing Kiem: « En sia interbatalado tiuj du kulturoj estas kurbigitaj. La geografia situacio de nia regiono, la facileco de la komunikiloj kaj la pure homa kunvivado devigas ilin, trovi sintezan solvon de la problemo. Tio estas ebla, ĉar, kvankam laŭ la vortoj de Konfucio la influoj de la ĉirkaŭaĵo disigas la homojn, tamen la naturo ilin rekunigas. Indonezia junularo agos bone, esplorante la fontojn de ambaŭ kulturoj. Ĝi nur prenos de ili tiujn kvalitojn, kiuj havas daŭran valoron, por poste ilin kombini. »

Kiel en Sovetujo la infanoj estas venenigataj per Militarismo

Kiun rolon la militaj ideoj ludas en la eduka programo de la rusaj bolŝevistoj, oni ekkonas el la tielnomata « Vojenisacia » — programo, kiu eĉ okupiĝas pri la ludoj de la plej junaj infanoj. Jen ekzemplo.

« La edukanto altiras la atenton de pli granda aro da infanoj per rakontado de militaj okazajoj el la historio de la Unuiĝo de Socialistaj Sovetaj Respublikoj, ekzemple el la civila milito de la jaroj 1919-1921. Li instigas la infanojn, ke ili imitu la okazajojn per specialaj korpaj movoj kaj sonoj kaj per tio interne retravivu ilin. — « Kion ni nun volas ludi, tio vere okazis antaŭ 12 jaroj. Tiam ni ankoraŭ ne havis hejtajn kiel nun kaj ankaŭ neniujn maŝinojn ». La infanoj faras en- kaj elspir-ekzercojn. Ĉe la elspirado estigas raŭkaj sonoj. « La fabrikejoj ĉiuj ripozis ». La infanoj ekstaras senorde kiel fabrikejaj funtuboj, kiujn ili nun imitas. La kunigitaj pugnoj tenataj antaŭ la buŝo prezentas la silentajn fabrikejsirenojn. « La elmodiĝintaj maŝinoj ne plu multe taŭgis ». Malrapidaj brakomovoj imitas la pezan puŝadon de la maŝinoj. « Por ilin movigi, la laboristoj devis mem alporti la hejtmaterialon ». La infanoj faras ventroturojn, kiuj fortigas la ventromuskolojn kaj dorsomuskolojn. Per tio sana sangocirkulado estas akcelata. « La caristaj generaloj alproksimiĝis al la urbo. Rapide la laboristoj estas ekzercataj kiel soldatoj. » La infanoj formas longajn vicojn kun regulaj distancoj kaj poste ekmarŝas, kantante konatajn revoluciajn kantojn. La levado kaj mallevido de la brakoj aludas ia moviĝon de la pafiloj sur la ŝultroj. « Baldaŭ estiĝis la unua kanona pafado ». La gejunuloj, kiuj nun mem prezentas kanonojn, antaŭenpuŝas la brakojn — la kanontubon. Tio signifas, ke la kanono estas ŝargata. Je la signo « Bum » la infanoj ekkaŭras, poste reensaltas unu paŝon kaj denove starigas sur la malnovan starejon. — la efiko de la pafado al la kanono. Guste ĉi tiu ekzerco estas bonega, la dorso rektiĝas, ĉiuj muskoloj streĉiĝas. « Esploristoj estas forsendataj ». La infanoj rampas sur kvar piedoj — bonega gimnastiko por la krurmuskoloj. « La proksimbatalo komenciĝis ». La infanoj kaŝas sin malantaŭ arboj aŭ benkoj tiucele starigitaj. Je la krio « Fajron! » ĉiuj manbatas. « Kaj jen la atako! » En kurbita sinteno oni antaŭenkuras. Tio estas bonega ekzerco por la memdisciplino. Ĉar en tiu momento la streĉiteco de la ludantoj atingas sian plejsupron; ili apenaŭ estas reteneblaj. Ĉi tie la eduko al oboe devas komenciĝi. — Post prezentado de pluaj batalscenoj oni ludas malvenkon. « Ankaŭ se oni malvenkas, la batalvolo tamen restas ». La infanoj denove streĉiĝas. »

Prave oni pri tio indigniĝas. Tamen iom da esploro de la propra konscienco estas utila. Ĉu ne tiaj ludoj estas simplaj « proletariaj » tradukoj el la « burĝa » militarista kaj naciista junulara edukado? Kaj ĉu ne ankaŭ kristanaj familioj, lernejoj kaj asocioj instruas siajn infanojn kaj gejunulojn, ke ili « militludu ». Oni forgesas, ke la milito ne estas ludo, nek la « burĝa » nek la « proletaria ».

VORTOJ DE EPISKOPO

LA JUNA BATALANTO ŝajnas esti laŭeble akcelinta la grandan mision de la kristana interfratigo de malsamaj nacioj kaj tiel esti interproksimiginta multajn homajn korojn : tial estus tre domaĝe, se tiu gazeto devus malaperi.....

Alba Julia (Rumanujo), la 14 marto 1931.

† Gustavo Karlo Majlath,
episkopo de Transilvanio.

Kulturmalsaĝaĵoj de la Okcidento

Sensacia propono estas antaŭ nelonge elparolita en la urbestro de Shanghai. Oni postulis specialan imposton por ĉiu fiino, kiu ne povos adiaŭi kolumojn kaj kravatojn, tiujn « kulturmalsaĝaĵojn de la okcidento ». Esperable baldaŭ simila leĝo liberigos la virojn de Eŭropo de tiuj barbaraj kaj senencaj homurmentoj !
Laŭ ĵurnalraportoj.

PRIPENSINDAJ NOMBROJ.

La membroŝtatoj de la Ligo de Nacioj pagas ĉiujare por la funkciado de la Ligo de Nacioj jenajn sumojn (en anglaj funtoj) :

la 2 aŭstraliaj ŝtatoj	37 000,
la 3 afrikaj ŝtatoj	18 000,
la 5 aziaj ŝtatoj	176 000,
la 17 amerikaj ŝtatoj	126 000,
la 27 eŭropaj ŝtatoj	629 000,

la 54 membroŝtatoj do pagas entute 896 000 anglajn funtojn por la Ligo.

La samaj ŝtatoj elspezis en la jaro 1929 por armeo, ŝiparo kaj aliaj militpreparoj :

la 2 aŭstraliaj ŝtatoj	5 910 000,
la 3 afrikaj ŝtatoj	1 050 000,
la 5 aziaj ŝtatoj	118 820 000,
la 17 amerikaj ŝtatoj	30 160 000,
la 27 eŭropaj ŝtatoj	519 470 000,

do entute 670 410 000 anglajn funtojn.

Tio signifas, ke la membroŝtatoj de la Ligo de Nacioj per nur unujara elspezo por militpreparoj povus pagi la elspezojn de la Ligo de Nacioj dum 685 jaroj!

La militelspezoj konsistigas en procentoj de la tuta budĝeto : en Germanujo 5 procentojn, en Rusujo 14,4 procentojn, en Francujo 17,9 procentojn, en Italujo 23,7 procentojn, en Polujo 35,0 procentojn

Ĉion ĉi la politikistoj nomas malarmado! Kaj samtempe ili preparas la venontan militon! Ĉar se oni konstruas kanonojn kaj fabrikas venengasojn, tiam la milito venos, tio ja estas ilia destino. La popoloj mem devas okupiĝi pri la certigo de la paco per energia agado kontraŭ la milito. Kiu atendas la politikistojn kaj la registarojn, tiu atendas la venontan militon kaj la venengasmorton !

« Vom frohen Leben », Berlin.

MONON sendu ĉiam, por eviti komplikajojn, al la persona adreso de la eldonejestrino: Regina Reiff, Kœln-Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ., aŭ al unu el la Poŝtkontoj nomitaj sur la dua paĝo de la kovrilo. Skribu la nomon de la konto ĉiam tre skrate !

KIOM KOSTIS LA GRANDA MILITO?

La nederlanda ĵurnalo « Telegraaf » provas kunmeti la kostojn de la Granda Milito. Laŭ tio la tutaj militkostoj sumiĝas je 3 000 miliardoj da svisaj frankoj. Por pagi tiun sumon, oni estus devinta remeti en ĉiu horo de post la naskiĝo de Kristo 180 000 sv. fr.! 13 milionoj da registrotroj da ŝipoj estas detruitaj, kio egalas al ŝiparo de 3250 ŝipoj 4000-tonaj. Ilia valoro estas proksimume 20 miliardoj da sv. fr.: la valoro de la detruitaj domoj estas 60 miliardoj. Ankoraŭ multe pli teruraj estas la perdoj je homvivoj: dum la 1561 tagoj de la mondmilito ĉ. 10 milionoj da homoj estas mortigitaj sur la batalejoj, tiel ke proksimume 6400 ĉiutage aŭ 4 homoj ĉiunminute mortfalis. Je la sekvoj de la milito mortis entute 13 milionoj da civilaj personoj, 20 milionoj da soldatoj, 3 milionoj da kapitoj; 9 milionoj da infanoj la milito orfigis, 5 milionoj da virinoj ĝi vidviniĝis, 10 milionoj ĝi devigis foriri de siaj loĝejoj. Por atingi la grandegan nombron de la militoferoj, oni devus dum 70 jaroj ĉiutage submerigi ŝipon kun 1000 homoj.

...Tamen el tiuj perdoj evidente oni ne tro multe lernis: Dum ke antaŭ la milito Eŭropo kalkulis preskaŭ 20 milionojn da militpreparitaj soldatoj, ilia nombro estas nun, malgraŭ la perforta malpermeso al kelkaj landoj, jam 30 milionoj...

« Chronik der Menschheit », Schweidnitz

LEVIGANTA AFRICO

En januaro 1931 okazis en Bloemfontein grava kongreso, kiun ĉeestis delegitoj de ĉiuj neeŭropaj elementoj de la sudafrika loĝantaro. Oni decidis, sendi al Eŭropo kvinmembran delegitaron, por klarigi al la brita registaro kaj al la brita popolo la sintenon de la indiĝenoj rilate la problemon de la samrajteco kaj por raporti pri la vera situacio de la kolorhaŭtaj homoj en tiu lando. Krome ĝi provos aliri anglajn parlamentanojn el ĉiuj partioj, la komitaton pri naciaj malplimultoj en la Ligo de Nacioj kaj aliajn gravajn instituciojn. Tiuj delegitoj raportos ankaŭ skribe kaj buŝe al la delegitoj de la pli ol 50 registaroj, kiuj ĉeestos la Kunvenon de la Ligo de Nacioj en septembro, pri siaj postuloj kaj plendoj.

Protestanta Junularo por Malarmado

En la lasta kunsido de la Ekzekutiva Komitato de la Mondligo de Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (YMCA) okazinta 21-27 februaro 1931 en Genève, i. a. estas akceptita jena rezolucio: « Konsiderante sian grandan respondecon pri la nuna movado favore al efika malarmado, la Ekzekutivo de la Mondligo de Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj alvokas ĉiujn naciajn asociojn, ke ili energie uzu sian influon al siaj popoloj kaj registaroj, por atingi, ke la venonta Malarmada Konferenco, laŭ art. 8 de la Pakto de la Ligo de Nacioj kaj la aldonita oficiala korespondado, koresponde al la enkonduko al Parto 5 de la Pakkontrakto de Versailles kaj la aldonita korespondado kiel ankaŭ laŭ la Kellogg-Pako, konduku al **fakta kaj esenca malpliigo de la militarmadoj**. La Ekzekutivo rajtigas la estraron, fari utilajn klopodojn por efika realigo de ĉi tiu rezolucio. »

La samajn postulojn ankaŭ devas elparoli la katolika junularo. Ĝiaj asocioj ne forgesu sian respondecon!

300 NOVAJN ABONANTOJN ni bezonas, por povi ekzisti, 500, por povi pligrandigi kaj plibeligi nian gazeton. Varbu kaj propagandu!

La Nuntempa junularo bezonas Esperanton

La hotela loĝado ne plu sufiĉas. Tro kara ĝi estas. Multaj kunportas tendon kaj kuiras mem sur alkohola lampo. Ankaŭ multiĝis la junular-dormejoj kun pajlo kaj sakoj.

Al miloj da gejunuloj plaĉas pli kaj pli la sporto kaj pejzaĝo ol la komforto kaj manĝado. Pano, supo, fruktoj kontentigas ilin kaj ebligas antaŭe neblajn vojaĝojn. Pri tiu demokratigo de l'turismo ni sincere ĝoju.

Estas ja bone ke la popoloj ekkonatiĝu rekte per la somera migrado de siaj junularoj. Sed kiel funkcias la tuta afero lingve? Regas vasta babelo malordo kaj balbutado de lernitaj frazoj en la ĉefaj fremdlingvoj. Estas la triumfo de l'hotelpordista dialekto.

Ne parolu al mi pri la « literatura sento en fremda lingvo » aŭ « penetro en la animon de ceteraj popoloj », kiam temas pri mendo de trinkaĵo, aĉeto de bileto kaj fuŝdemando pri la vojo aŭ vetero. Al oreloj de literaturisto povas nur mordi malagrabla tiu primitiva vundado de belaj lingvoj.

Por sia praktika urĝa celo ĝi apenaŭ sufiĉas. Por vera kontakto kun alia popolo, ĝi estas absolute nesufiĉa. Veraj interparoloj kun enlandanoj, profundaj amikiĝoj per interesa interŝanĝo de spertoj aŭ ideoj, jen kio mankas plej ofte.

Sed jam parto de la moderna junularo trovis la eblecon eliri el tiu malfacilaĵo. Inter la someraj gemigrantoj troviĝas jam multaj, kiuj lernis Esperanton kaj uzas ĝin. Ĉar la lingvo estas facila kaj simpla, ĉar ili ne ĉiam sentas sin ĝenataj per timo pri eraroj kaj embaraso pri verboj aŭ artikoloj, tiuj esperantistaj turistoj povas esprimi sian penson libere. Armitaj per sia UEA-Jarlibro ili scias, kie renkonti enlandanojn konantajn la lingvon. Almenaŭ ili spertas liberan kontakton.

D-ro Edmond Privat (« Esperanto », Genève).

Pli grandan seriozecon en la Katolika Esperanto-Movado!

Bedaŭrinde estas, ke ankaŭ la katolikaj Esperanto-kongresoj alprenas la karakteron de nura jarfesto. En Budapeŝto la laborkunsidoj estis malmultaj, nur du. Kaj oni ankaŭ sentis, ke la katolikaj kongresanoj ne interesiĝis pri la kelkaj temoj pritraktitaj; ĉar plejparte, dum iu aŭ alia parolis, ili kolektis subskribojn, sendis poŝtkartojn al amikoj aŭ daŭrigis konversacion kun najbaroj. Ili venis Budapeŝton, por amuziĝi!

Ne plu estas seriozece en niaj katolikaj kongresoj. Kaj se ili devas fariĝi nur festoj, ne necesas ilin apartigi de la neŭtralaj universalaj kongresoj de Esperanto; la katolikaj esperantistoj tre facile povas amuziĝi kun la neŭtraluloj en la sama urbo. Por lerta observanto la esperantistaj kongresoj estas nur okazoj por amuziĝi — tamen ŝajnas, ke la proletaria SAT-kongreso estas ĝojiga escepto — kaj oni unuavide deduktos, ke la internacia lingvo Esperanto estas nur danda amuzilo. Ne miru do, se post profunda ekzameno de nia agadmaniero multaj

scienculoj, laboremuloj, komercistoj, juristoj, internaciuloj — kiuj tamen konscias pri la nepreco de internacia komprenilo — ne aliĝas al nia movado, ne alprenas Esperanton, ĉar per tiu lingvo neniu serioza profito estas atendebla. Ne miru do, se ekleziaj eminentuloj rigardas malŝate nian katolikan Esperanto-movadon, ĉar ili ne vidas en ĝi perilon je la servo de la granda laboro de la Eklezio. Kion gravan ja alportis niaj internaciaj kunvenoj al la internacia kunlaborado de la katolikoj? Nenion. Ĉu vi do pensas, ke episkopoj, pastroj, eminentaj laikuloj lernos Esperanton, por veni en iun aŭ alian urbon de la mondo kaj tie amuziĝi babilante esperantlingve pri bagatelaj aferoj? Se jes, vi tute eraras! Kaj via erara sintenado senkapabligas nian movadon kaj malebligas ian ajn progresadon...

Pastro Georges Ramboux («*Espero Katolika*»).

KIAL vi ankoraŭ ne estas membro de MOKA? Aliĝu!

El la Katolika paca Movado

Internacia Katolika Paca Kongreso estas organizata por aŭgusto nunjara en Nederlando. La Nederlanda Katolika Paca Ligo preparas ĝin. La Juna Batalanto ankoraŭ publikigos detalojn.

Aŭstrujo. La konata pioniro de la katolika pacifismo Pastro Franziskus Stratmann O. P. faris paroladvojaĝon laŭ invito de la juna Paca Ligo de Aŭstraj Katolikoj. La paroladoj estis bone vizitataj kaj tre sukcesaj. Kiel nia nacia sekretario Walter Mudrak raportas, ankaŭ en la rondoj de la Esperanto-movado katolika kaj nekatolika oni fervore kunlaboris. La Ligo okazigis en februaro kaj marto interesan kurson, en kiu paroladis Supera Konsilanto D-ro Katann, prezidanto, Ĝenerala Sekretario Kaspar Mayr, sekretario, Universitata Profesoro D-ro Verdross kaj sekcioestro D-ro Hartwich pri la plej gravaj ideoj kaj faktoj de la paca movado.

Germanujo. La Paca Ligo de Germanaj Katolikaj havas novan ĝeneralan sekretaron Paulus Lenz en Frankfurt kaj reaktivigis sian agadon. La 28/29 marto okazis en Köln Katolika Konferenco por Germana-Pola Interkomprenigo, organizita komune de Paca Ligo Katolika, Mondjunularo Katolika kaj Fratara por Interpaco, Raporton vidu sub «*Nia Movado*». Tuj poste okazis kunveno de la naciaj komitatoj kaj estraro de la Paca Ligo. La nunjara kongreso estos en novembro kaj pritraktos la aktualan temon «*Ligo de Nacioj kaj Malarmado*».

Svisujo. Post paroladoj de Pastro Stratmann landigis katolika paca grupo en Basel. En Genève laboras la internacia «*Cercle Catholique de Genève*» kaj faras bonegan kaj neceseĝan agadon.

Usono. Kun granda ĝojo ni ricevis raporton pri la Katolika Paca Tago festita en la tuta lando en la semajno de la 15 al la 21 marto, por p'nenigi la proponon de la Sankta Patro, kiu alvokis la katolikojn denove al paca agado en sia kristnaska parolado lastjara. La grandaj katolikaj asocioj kune kun la Paca Ligo (Catholic Association for International Peace) organizis grandstilan propagadon. Ekz. la socia selekto de la National Catholic Welfare Conference iniciatis la festadon de la Paca Tago en 169 Newman-k'uboj, la Katolika Paca Ligo agadis en 162 universitatoj kaj kolegioj, la Katolika Virina Asocio en 1735 kaj la Katolika Virina Ligo en 2500 lokaj unuigoj. Ankaŭ pred'kejo, gazetaro kaj rad'io estas utiligataj por la bona celo. La Paca Ligo kaj ankaŭ la Welfare Conference eldonis tre efikajn broŝurojn kaj propagand'ojn, kiujn oni grandkvante disvastigis. Ni gratulas la katolikan pacan movadon de Usono pro ĝia bela aktiveco kaj rekomendas ĝian ekzemplon al imitado en la tuta mondo. — La kvina jarkunveno de la Paca Ligo okazas 6-7 aprilo 1931 en New York kaj havas antaŭ si tre gravan kaj interesan programon. Saluton kaj sukcesan laboron!

NIA JUBILEA KOLEKTO por La Juna Batalanto, kiun ni komencis okaze de la 10-jara ekzistado de nia movado, ankoraŭ ne estas fermita. GI ATENDAS VIAN DONACON!

Gravaj internaciaj Kongresoj kaj kunvenoj 1931

Kiel ĉiujare, MOKA kunmetis liston de gravaj internaciaj konferencoj, kongresoj, kunvenoj, tendaroj ktp. Tiu listo aperas en diversaj lingvoj kaj sinsekvaj eldonoj. Pri detaloj, programoj ktp. oni skribu al la citataj adresoj; ĝeneralaj informoj estas ankaŭ donataj de la internacia oficejo de MOKA, sed oni ĉiam aldonu duoblan afrankon aŭ du internaciajn respondkuponojn. La listo estas daŭrigota kaj kompletigota. Pri kelkaj arangoj la definitiva dato ankoraŭ ne estas fiksita. Ni atentigas, ke la citado ne ĉiukaze signifas senrezervan rekomendon de la kongreso aŭ de la invitanta organizado.

- | | | |
|------------------------|--|---|
| 6-7 aprilo | New York City, Usono | Jara kongreso de la Katolika Asocio por Internacia Paco. Catholic Association for International Peace, 1312 Massachusetts Ave., Washington, D. C. |
| 6-12 aprilo | Freusburg, Germanujo | Laborsemajno por Vivreformo kaj Kultura (internacia). Hedwig Eichbauer, Hamm a. d. Sieg, Germ. |
| 10-15 majo | Roma, Italujo | Int. Jubileaj Solenoj pri a laborista encikliko « <i>Rerum Novarum</i> », Azione Cattolica Italiana, Roma. |
| 29 majo-2 junio | Pariso, Franc. | Konferenco de francaj kaj germanaj katolikoj (politikistoj). Nur por invitotoj. |
| 5-9 julio | Bruxelles, Belgio | Internacia Paca Kongreso. Bureau International de la Paix, 8, Rue Charles-Bonnet, Genève, Svisujo. |
| 14-20 julio | Budapest, Hungarujo | Internacia Tendaro de Skolta Esperantista Ligo. Hungara Skolta Rondo Esperantista, Budapest V., Nagy Sandor utca 6. |
| 25 julio-2 aŭgusto | Den Haag, Nederlando | Esperantista Libertempo. British Esperanto Association, 142, High Holborn, London WC 1. |
| fine de julio | Berlin, Germ. | Antaŭkongreso Esperantista. E. Lindemann, Berlin W 8, Französische Strasse, 9-12. |
| 1-4 aŭgusto | Lyon, Franc. | Kongreso de la Internacio de Milit-kontraŭuloj. War Resisters International, Rushm Brown, Enfield, Middlesex, Anglujo. |
| 1-8 aŭgusto | Krakow, Polujo | Universala Kongreso de Esperanto. Lubicz 34, Krakow. |
| 4-12 aŭgusto | Vessigebro, Svedujo | Int. Junulara Tendaro. Int. Ungdoms Liga, Postbox 122, Köbenhavn K., 6, Danujo. |
| aŭgusto | Nederlando | Internacia Katolika Paca Kongreso por Malarmado. Detaloj sekvas. |
| aŭgusto | Luzern, Svis. | Internacia Katolika Kongreso de IKA Msgr. Dr. N. Pfeiffer, Košice, Ĉeĥosl. |
| 15-22 aŭgusto | Elberfeld, Germ. | Esperantista Libertempo. BEA, 142, High Holborn, London WC 1, Anglujo. |
| 9-11 aŭgusto | Warszawa, Polujo. | Postkongreso Esperantista. Widok, 19, Warszawa. |
| aŭgusto | Cleveland (Usono) -Toronto (Kanado) | Mondkongreso de la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj. Rue de Montchoisy, 2, Genève, Svisujo. |
| 15-24 aŭgusto | Genève, Svisujo | Instituto por Internaciaj Rilatoj. Institute of International Relations Genève. |
| 22-29 aŭgusto | Lunteren, Nederlando | Internacia Konferenco de la Fratara por Interpaco. Kaspar Mayr, Wien VII., Döblergasse 2/26, Aŭstrujo. |
| fine de aŭgusto | Bruxelles, Belgio | Internacia Studsemajno de la Katolika Junularo. A. C. J. B., 48a, rue V. Decoster, Louvain, Belg. |
| 7 ? ? aŭgusto-septembo | | Internacia Katolika Kongreso por la Reĝeco de Kristo. Pastro Ka'an, Leoninum, Ljubljana, Jugoslavujo. |
| fine de oktobro | Riga, Latvujo | Orienteŭropa Konferenco de la Fratara por Interpaco. Kaspar Mayr, Wien VII., Döblergasse, 2/26, Aŭstrujo. |
| 1-2 novembro | Berlin, Germ. | Kongreso de la Paca Ligo Katolika kun internaciaj parolantoj kaj gastoj. F. d. K., Frankfurt a/M., Liebfrauenberg, 37, Germanujo. |

NIA MOVADO

Internacia Oficejo.

Ekzekutiva Komitato. La venonta kunsido estos la 26 aprilo en Essen.

Internacia Komitato. En ĉi tiuj tagoj estos dissendata nova cirkulero.

Jara raporto. La jara raporto de MOKA aperos baldaŭ kaj estos sendata al tiuj membroj, kies kofizon ricevis la internacia sekretario. Aliaj interesitoj povos ricevi ĝin kontraŭ respondkuponon.

Katolika Vivo. Pri nia kunlaboro kun la gazeto « Katolika Vivo » decidis komuna konferenco de MOKA kaj de la Esperanto-Sekcio de IKA, kiu okazos la 26 aprilo en Essen. Kredible sistemo de kombinita abono de K. V. kaj J. B. je favoraj prezoj ebligos. Kiu deziras ĉeesti la konferencon kaj ne ricevis specialan inviton, petu informon de la redaktoro de J. B.

La internacia sekretario nun troviĝas por kelkaj semajnoj eksterlande kaj ne povas respondi leterojn. En la proksimaj monatoj li nur tute escepte povos akcepti invitojn al vizitoj, paroladoj, ĉeesto je kunvenoj ktp.

Perado de korespondado. Ni faras urĝan alvokon al niaj amikoj tutmondaj, ke ili anoncu sin kaj interesitajn geamikojn por internacia korespondado, ĉu en Esperanto ĉu en nacia lingvo. Speciale ni bezonas multajn adresojn de anglaj kaj francaj resp. anglalingvaj kaj franclingvaj katolikaj korespondemuloj, ĉar multegaj petoj nun ne povas esti kontentigitaj. Bonvolu tuj skribi, citante nomon, adreson, profesion, aĝon, lingvokonojn kaj specialajn interesojn, al la Koresponda Oficejo de MOKA, Conrad Thoonen, **Düsseldorf**, Behrenstrasse, 28, Germanujo.

Eldona Kooperativo LA JUNA BATALANTO.

Membroj. Aligis al la kooperativa societo per jenaj partoprenosumoj:

Kanoniko Giovanni Rotonido, Bari,	20,00 RM.
Maria May, Krefeld,	20,00 RM.
D-ro Nikolaus Ehlen, Velbert,	10,00 RM.
Pastro Pelegrinus Hoffmann, O. S. B., St. Ottilien,	50,00 RM.

Ni bezonas ankoraŭ kelkajn pluajn membrojn kaj invitas niajn gelegantojn ke ili aligu!

Jubilea Kolekto. Ni danke kvitanças la jenajn sumojn: Episkopo D-ro M. en A. J. 73,07 RM., H. T. en K. 3.— RM., Pastro S. en R. 1.— RM., Pastro K. S. en C. 0,45 RM., Pastro H. W. en H. 1.— RM., Kanoniko D-ro A. E. en P. 1.— RM., Pastro R., S. J., en Ch. 1,19 RM., Pastro M. M. en L. 4.— RM., Pastro A. S. en K. 20.— RM., G. S. en St. 3.— RM., Pastro F. S. en St. 1.—, Sumo: 108,71 RM., antaŭaj listoj: 122,20 RM., Tuta ĝisnuna sumo: **230,91 RM.** La kolekto ankoraŭ restas malfermata. Ni urĝe alvokas niajn gelegantojn, ke ili plu helpu!

Anglujo.

Provizora nacia sekretario de MOKA fariĝis J. W. Stannard, 76, Marlborough Road, Norwich, Norfolk.

Aŭstrujo.

Wien. Nia nacia sekr. Walter Mudrak fariĝis vicprezidanto de la Katolika Unuiĝo Esperantista de Wien. En tiu unuiĝo li ankaŭ faris paroladon pri la temo: « Ĉu angla lingvo aŭ Esperanto? », responde al artikolo aperinta en la katolika ĉeforgano « Reichspost » kaj en kiu Universitata Profesoro pledis por angla lingvo. Pri tiu afero ni ankoraŭ ricevas jenajn informojn: En januaro en « Die Quelle » (la fonto), dimanĉa aldono al « Reichspost », aperis artikolo pledanta por angla lingvo kiel mondlingvo, kaj tiuokaze estas malfermita diskutado pri la temo. Kvankam katolikaj Esperantistoj sendis artikolojn al la redakcio, aperis unue nur artikolo por Ido, unu eĉ pli malpli por Pidgin English kaj nur poste malonga « Vorto por Esperanto » de nia samideano Jungschaffer el Ried, dum ke « Reichspost » la aliajn senditaĵojn aŭ ignoris aŭ resendis, ĉar « la diskutado nun jam estas fermita ». Post energia interveno letera flanke de katolikaj Esperantistoj kaj persona vizito de kompetentuloj de KUE Reichspost fine tamen konsentis aperigi artikolon pri kaj por Esperanto, verkitan en

vere bonega maniero de « Membro de la Stata Ekzamenkomitato », kaj tio estis, laŭ diro de la Reichspost-ĉefredaktoro D-ro Funder mem, la plej bona artikolo verkita kaj publikigita en tiu afero. Ni esperu, ke tiu fina atentemo kaj subtenemo de la Vienna katolika gazetaro por Esperanto ne restu unufojaĵo. — W. Mudrak daŭrigas la Esperanto-kursojn en « Kreuzbuendnis », unu por progresintoj, unu por komencantoj. Bedaŭrinde la kurso por komencantoj havas en ĉi tiu jaro nur 10 partoprenantojn. La ekonomia krizo efikas ankaŭ tie. — En la lasta tempo ankaŭ la ĉeĥa katolika junularo organizita en « Orel » komencis en Wien aktivan Esperanto-laboron. Niaj amikoj intencas helpi. — Por la katolika pacifismo varbis sukcesaj paroladoj de P. Fr. Stratmann O. P. en Wien, St. Poelten, Wiener-Neustadt, Salzburg kaj Innsbruck.

Ĉeĥoslovakujo.

Kelkaj novaj delegitoj kaj membroj. Oni preparas fondon de grupoj.

Germanujo.

Vojaĝa servo. En majo okazos MOKA-vojaĝo al Paris, pri kiu la nacia sekr. Heinz Kolvenbach donas pluajn informojn.

Gazetaro. « Die junge Lehrerin », organo de la junaj instruistinoj katolikaj en-havis longan artikolon de Regina Reiff pri MOKA, Esperanto, La Juna Batalanto. — « Die Wacht », ĉeforgano de Katolika Junvira Asocio, publikigis rekomendan artikolon pri La Juna Batalanto.

Paroladoj por pola-germana interkomprenigo. Niaj amikoj Kaspar Mayr (Wien) kaj Universitata Docento D-ro Dembinski (Krakow) faris en Okcidenta Germanujo diversajn sukcesajn paroladojn, pri kies preparo ankaŭ MOKA zorgis. I. a. li paroladis en Dortmund, Oberhausen, Krefeld, Aachen, Koeln, Bonn, Frankfurt, Essen, Velbert.

Pulheim. En marto parolado de D-ro W. Solzbacher en la Katolika Junvira Unuiĝo pri « Milito kaj Ekonomio ».

Koeln. En kurso de la Katolika Junmetiista Unuiĝo parolado de Solzbacher pri « La katolika junularo en la tuta mondo », en kunveno invitita de virina rondo por paca agado paroladeto pri « paco kaj junularo ».

Irlando.

Belfast. Nova del. de MOKA: William Brady.

Svisujo.

La Katolika Junvira Asocio deziras bonan kunlaboron kun MOKA. La sekretario faris studvojaĝon eksterlande kaj ankaŭ intertraktis kun la germana sekr. de MOKA H. Kolvenbach.

Katolika Konferenco por Pola-Germana Interkomprenigo.

La 28/29 marto okazis en Koeln kunveno komune organizita de la Paca Ligo de Germanaj Katolikoj, de Mondjunularo Katolika kaj de la Fratara por Interpacigo. Ĝi staris meze en la kadro de paroladovojaĝo, kiun ĉefsekretario Kaspar Mayr kaj D-ro Dembinski faris en Okcidenta Germanujo. Ĉeestis ĉ. 60 speciale invititaj personoj (oni ne publike invitis), inter kiuj ĉ. 15 de pola nacieco kaj deko da pastroj, inter kiuj unu dominikano, unu franciskano kaj unu jesuito. Multaj estis fakuloj pri la pritraktota temo kaj preskaŭ ĉiuj estis gvidantoj el katolikaj asocioj.

La unuan paroladon faris **Kaspar Mayr** (Wien) pri la taskoj kaj malhelpoj de pola-germana interkomprenigo. Post li **D-ro Dembinski** (Krakow) pritraktis konkretajn politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn problemojn, montrante la polan vidpunkton kaj eventualajn eblecojn de definitiva solvo. Estigis tre vigla kaj interesa diskuto, en kiu ekz. partoprenis Pastro Stratmann, O. P., Pastro Horstmann, S. J., Pastro Boehm, Profesoro Antz, S-ro Macejewski, D-ro Solzbacher, D-ro Ehlen, D-ro Kaczmarek. La grandaj suferoj de Polujo en la pasinta jarcento kaj la devo de ne nur ekstera, sed ankaŭ morala riparo de la tiama kulpco estas montritaj, same oni parolis pri la etnologiaj, religiaj kaj ekonomiaj faktoj.

La duan tagon okazis denove du kunsidoj, kies unuan oni dediĉis al la problemoj de la polaj malplimulto en Germanujo. **D-ro Kaczmarek** (Berlin), prezidanto de la Pola Asocio en Germanujo, estis la ĉefparolanto, raportanta pri nombro, ekonomia situacio, iernejoj, postuloj ktp. de la poloj en Germanujo. En la diskutado estis specia le grave, kion la nunaj aŭ estintaj animprizorgantoj de poloj Pastro Wachowski

(Köln). Pastro Böhm (Sieglar) kaj Pastro Horstmann S. J. (Duesseidorf) diris. Oni kompreneble ankaŭ parolis pri la problemo de la malplimulto entute kaj venis al tiuj konkludoj, kiuj laŭ la kristana spirito devus esti justaj. Ĉiu nacio devus rilati al la malplimulto en sia lando kun justeco kaj amo, kaj laŭ la regulo, ke fremdaj malplimulto en la propra lando estu same traktataj, kiel oni deziras, ke la propraj malplimulto estu traktataj en la fremdaj landoj. — La posttagmezon malfermis parolado de **Pastro Heinrich Horstmann, S. J.**, redaktoro de la katolika junula revuo « Jungwacht », pri « la taskoj de la katolikoj en la pola-germana interpaco », en kiu li montris la grandajn devojn kaj eblecojn kaj faris ankaŭ praktikajn proponojn. Cetere Pastro Horstmann apartenas al tiuj, kiuj ne kontentiĝas pri belaj proponoj, sed ŝatas mem komenci realigi ilin. Li do jam preparas vojaĝon kun trideko da junuloj el la Katolika Junvira Asocio al Polujo, por amikiĝi kun la pola popolo kaj speciale kun la katolika junularo de tiu lando. **D-ro Dembinski** raportis pri la komeĉoj de la katolika paca movado en sia patrolando. — La kunvenoj okazis en la internacia ĉeĉsekretario de la Katolika Junmetiista Unuiĝo, kaj Urbestro **D-ro Gunst** (Hüsten), prezidanto de la Katolika Paca Ligo, prezidis. — La Paca Ligo Katolika utiligis la okazon de la konferenco, por tiuj poste okazigi kunsidon de sia estraro kaj nacia komitato. Kelkaj ekzekutivanoj de MOKA havis okazon, preparoli kun **D-ro Dembinski** la praktikajn eblecojn de kunlaboro kun la katolika junularo de Polujo.

LETERKESTO.

Tutkoraŭ dankon al tiuj, kiuj, leginte la pendalvokon en la lasta numero, helpis nin, ĉu donacante por la Jubilea Kolekto, ĉu subskribante partoprenosumojn por nia Eldona Kooperativo ĉu antaŭpagante la abonprezon. Ĉi tiu numero aperas ankaŭ nur 12-paĝa, ĉar ni volas ŝpari monon, por estonte certigi pli akuratan kaj frutempan eliron de la numeroj. La pligrandiĝo espereble ankaŭ baldaŭ povos veni.

Varbado de abonantoj nun estas urĝa tasko. Estas nesana stato, ke ĉiujare devone ni devas peti specialan helpon por la nura ekzisto de nia gazeto. Eksterordinaraj kolektoj devus nur servi por eksterordinaraj elspezoj. Se la rapideco en la kreskado de nia abonantaro restos en la nova jaro, kiel ĝi estis en la lasta, ni atingos nian celon. Sed nepre antaŭkondiĉo estas, ke niaj novaj abonantoj fervore varbu.

Poemoj povas esti akceptataj por J.B. nur en tute specialaj kazoj.

M. V. (Rusujo) kaj J. M. H. (Japanujo), Manko de loko malpermesas publikigon de viaj interesaj informoj.

La nova ĵarkolekto de J. B. komenciĝos per la sekvonta numero. Ni petas niajn fidelajn gelegantojn, ke ili laŭeble tuj sendu sian abonprezon kaj membrakviziton. W.S.

EL LA ESPERANTO-MOVADO

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. La aŭstra ŝtato starigis kun grandaj kostoj por la Esperanto-Muzeo novan ejon «por eternaj tempoj» en la «Neue Burg» («Nova Kastelo»). I. a. vizitis la Muzeon kun granda intereso Kardinalo Piff de Wien kaj Stata Prezidanto D-ro Mikias.

En 712 lernejoj de 38 landoj Esperanto estas instruata; 6078 profesiaj instruistoj en 61 landoj estas Esperantistoj. Berlin ĵus nun decidis enkonduki Esperanton en 25 popollernejojn.

1748 radio-disaŭdigoj en kaj pri Esperanto okazis 1929 en Eŭropo; inter ili estis 602 kurs-disaŭdigoj.

La 23-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en aŭgusto 1931 en Krakow (Polujo).

Socialistaj instruistoj serioze interesiĝas pri Esperanto. En aŭgusto okazis en Paris kongreso de la Internacia Profesia Sindikato Instruista; oni decidis unuvoĉe, peti ĉiujn naciajn asociojn, propagandi Esperanton inter siaj membroj kaj en la publiko; krome oni estonte permesos Esperanton kiel oficiala lingvo en la kongresoj.

Esperantistaj Turistaj Komisionoj sukcese organizis vojaĝojn inter Svedujo kaj Estono dum la tuta somero. Multegaj homoj tiel estas interesitaj pri nia lingvo.

Sur nia Librotablo

Recenzoj de novaj libroj de internacia intereso.

League of Nations, Handbook of International Organisations. 348 pĝ. Société des Nations. Section des Bureaux Internationaux. Genève 1929.

La Ligo de Nacioj eldonis en ĉi tiu libro informojn pri pli ol 500 internaciaj organizaĵoj, kaj kompreneble la manlibro devas troviĝi en la laborcambro de ĉiu aktiva «internaciulo». Rilate la fideindecon bedaŭrinde la libro estas trecege malperfekta. Se ekz. nur ekzamenas tiujn informojn, kiuj nin speciale interesas, do la katolikajn, junularajn, pacifistajn kaj esperantistajn asociojn, ni trovas preskaŭ nekredoblajn erarojn. Ke nia propra gazeto «La Juna Batalanto» estas oficiala organo de IKA kaj ke episkopo Waitz de Feldkirch estas respondeca pri ĝi, estas afero, pri kiu nin «informas» oficiala eldonaĵo de la Ligo de Nacioj! El la Esperanto-gazetaro oni en Genève nur konas «Esperanto» de UEA, la nuntempe ne ekzistantan revuon «La Policisto» kaj nian «Juna Batalanto»! Pri gravaj organizaĵoj oni nenion sciak, pri signifaj grupetoj oni presigas longajn kolonojn. Vere, la tuta internacia laborado ankoraŭ troviĝas en tre malperfekta stato. Sajnas al ni, ke la redaktoroj de la manlibro estas kulpaj, ĉar ili ne sufiĉe zorge kolektis informojn, kaj ke precipe multaj internaciaj asocioj (inkluzive nia MOKA) estas kulpaj, ĉar ili ne regule informas la Sekretariejon de la Ligo de Nacioj.

Rev. Francis J. Haas, Ph. D., American Agriculture and International Affairs. Catholic Association for International Peace. Washington 1930, 36 pĝ., 10 cendoj.

La prezidanto de la Katolika Paca Ligo en Usono verkis gravan kaj interesan raporton pri la amerikana agrikulturo kaj la internaciaj rilatoj. Li speciale rekomendas la kooperativan movadon kaj politikon plibonigantan la vivnivelon de la kamparanoj.

Eugène Duthoit, Le Catholicisme Lien Social. 292 pĝ., Editions Spes, Paris 1929, 20 fr. fr.

La prezidanto de la Generala Komitato de la Socialaj Semajnoj eldonis siajn paroladojn el la lastaj jaroj kun aldono de gravaj aliaj artikoloj. Montri la valoron de la kreantaj ideoj enhavataj en la katolika tradicio, estas la celo. Por niaj legantoj ni citu speciale la artikolon pri «nacia kaj internacia devo» kaj la aldonitan respondon al demandaro de M. Vaussard pri la naciismo, respondon finigantan per la nobla vorto: «Alter alterius onera portato», «Unu portu la ŝarĝon de la alia».

Charles Ledré, Les Emigrés Russes en France. Ce qu'ils sont — Ce qu'ils font — Ce qu'ils pensent, 288 pĝ., Editions Spes, Paris 1930, 12 fr. fr.

Interesaj skizoj pri sortoj de rusaj elmigrintoj, kiujn ni observas en ilia ekzilo. Dekstruloj kaj maldekstruloj, oficiroj kaj verkistoj, ĉiuspekaj homoj aperas antaŭ ni: revuo de Kutepoff ĝis Kerenski! Nin interesas speciale tiu, kion la elmigrintoj pensas pri la boŝevismo kaj aliparte, kion la aŭtoro observis pri la religiaj tendencoj de la rusoj, kiuj nun vivas eksterlande.

Thomas Ohm O. S. B., Kulturen, Religionen und Missionen in Japan. en la serio «Salzburger Abhandlungen und Texte aus Wissenschaft und Kunst», 216 pĝ., 1 kolorotabulo kaj 39 ilustraĵoj. Dr Benno Filser-Verlag Augsburg, 10.— Reichsmark.

Grava scienca kaj tamen facile komprenebla verko pri Japanujo, precipe laŭ misiologia vidpunkto. La saĝa benediktano raportas pri la rilatoj inter Budhismo, ŝintoismo, Konfucianismo, Kami-Servo, la katolikaj, protestantaj, ortodoksaj, mahometanaj misioj ktp., pri materialismo kaj novaj sektoj. Belegaj estas la bildoj, bouega estas ankaŭ la ekstera arango de la libro. Ankaŭ pri la stranga sekto «Oomoto», nun propagandata en la tuta mondo pere de Esperanto, enestas malgranda ĉapitro. Aldonata estas landkarto de la katolika misio en Japanujo.

P. Konstantin Roesch O. M. Cap., Das Neue Testament, übersetzt und kurz erläutert, 174a — 193a mĝ., Ferdinand Schoeningh, Paderborn (Westfalen) 1930, 608 pĝ., bind. 2.— RM.

La plej bona malmultekosta germanlingva eldono de la Nova Testamento. Rekomendinda!

Peter Doerfler, Der junge Don Bosco, 224 pĝ., Herder 1930, Freiburg, kart. 2,30 RM., bind. 3,30 RM.

Sanktuloj ne estas timemaj, skrupulencmaj malĝojuloj kaj grumbuloj! Tion lernu niaj geknaboj el la admirinda libreto de Peter Doerfler pri la juneco de la granda Don Bosco. Vere literatura perlo kaj pedagogia valorajo! Donacu ĝin al junulo kaj junulinoj!

Wilhelm Matthiessen. Der Herr mit den hundert Augen, 2a eldono, Herder, Freiburg 1930, 230pg., 3,20 RM., bind. 4 RM.

La aventuroj de esplora ekspedicio en la montaro de Tibeto, rakontitaj en modera maniero al nia junularo. « La sinjoro kun la cent okuloj » estas germana junulo kun admirindaj detektivaj kvalitoj.

Lisbeth Burger, 40 Jahre Storchentante, 266 pg., Bergstadt-Verlag, Breslau 1929, 4,50 RM., bind. 6,— RM.

Lisbeth Burger, Die Maedels aus der Fadengasse, 272 pg., Bergstadtverlag W. G. Korn, Breslau 1930, 4,50 RM., bind. 6,— RM.

Jen du libroj kun veraj rakontoj el la vivo de sperta virino. Verkita en modesta klara, interesa kaj taktoplena maniero, ili estas trege taŭgaj, por paroli al junaj homoj pri la sankteco de amo, edzeco kaj familio, por montri la danĝerojn kaj erarojn en seksaj aferoj. Du libroj trege necesaj por la pli aĝa junularo de nia tempo kaj prave tiel entuziasme akceptitaj de la gazetaro, precipe de la katolika. Kristana vivkoncepto montras en la libroj de Lisbeth Burger altan idealon en idola epoko.

Kommende Gemeinde, Liebe und Ehe aus letzter Verantwortung, eine positive Auseinandersetzung mit dem Amerikanismus, Verlag C. L. Hirschfeld, Leipzig 1930, 220 pg., 3,60 Reichsmark.

« La venonta komunumo » estas serioza revuo eldonata de profunde serĉanta kristana rondo venanta el la junulara movado. Tiuj homoj volas trovi sian stacion en tempo kaj vivo kun plena respondeco. Venantaj el protestantaj medioj, ili tamen estas malfermataj ankaŭ al katolikaj kaj aliaj ideoj. La kajero pri « amo kaj edzeco » estas vere irapanta ekzemplo de ilia serĉado. La diversaj artikoloj estas tre malsamaj laŭ tendenco kaj valoro, kaj tamen el ili oni pli klare, malgraŭ grandegaj eraroj, vidas la problemaron de la grava temo ol en iu alia libro. Unue legante la libron, oni ofte havas la impreson de maltrankvila konfuzo, sed oni ankaŭ — mi ne scias kial — ricevas la esperon, ke eble iam tiu konfuza maltrankvilo turnigos al la eterna vero... La kajeron mi rekomendas al pastroj kaj pedagogistoj. Sed oni ne forgesu, ke la valoro de la libro konsistas en la demandoj, ne en la respondoj, en la montrado de problemoj, ne en ilia solvo.

Fahsel, Helmut, Kaplan, Ehe, Liebe und Sexualproblem, 15-19a n-ro, X + 142 pg., Freiburg 1931, Herder, broŝ. 4,— RM., tolbind. 5,40 RM.

Pastro Fahsel faris en la lastaj jaroj multajn paroladojn pri la problemoj de amo, edzeco kaj seksaj rilatoj, kaj el tiuj paroladoj estiĝis la libro. Ĝi estas verkita en tute filozofia maniero, elirante de la pensoj de Platon en la « Symposion ». La ideo de la sesforma (trioble bezona kaj trioble kreanta) eros formas taŭgan bazon. Pri fiziologiaj kaj biologiaj faktoj kaj fenomenoj la aŭtoro ne parolas, sed ilian konon antaŭsupozas. Al kleruloj, kiuj kutimiĝis enpensi en Platonajn filozofiajn, la libro estas rekomendinda. La severa sistemo kompreneble havas grandan valoron. Tamen ŝajnas dube, ĉu ĝi vere estas taŭga por elcerpi tiajn centrajn vivproblemojn, kiujn pritraktas la libro.

Dr. F. E. May, Die glückliche Ehe, Ein ethischer Lebensführer, Ferd. Schoeningh, Paderborn 1929, bind. 5,50 RM.

Katolika libro pri la edzeco, verkita kun sincereco kaj komprenemo. La plej novaj sciencaj seksologiaj esploroj estas utiligitaj, la tuto bazas sur forta etika fundamento.

D. F. E. May, Mehr Sonne, Ein Buch der Lebensfreude, kun 11 bildoj, 155 pg., Schoeningh, Paderborn 1930, tolbind. 5,— RM.

Libro, kiu volas porti sunon kaj ĝojon en la homan vivon, montrante la naturajn kaj supernaturajn fontojn de la ĝojo. La kristanismo kiel religio de la ĝojo — jen la enhavo. Al simplaj kaj meditemaj homoj la libro povas doni tranĝvilajn horojn de ĝojo kaj kelkajn sunradetojn por ilia ĉiutaga vivo.

Thomas von Kempen. Das Buch von der Nachfolge Christi. Uebersetzt von Bischof J. M. Sailer, neu herausgegeben von Dr. Franz Keller. Kun 56 bildoj de Joseph von Führich, 17a eldono, 24-o, XXIV + 536 pg., Freiburg 1931, Herder, tolbind. 2,20 RM., ankaŭ en pli multekostaj bindaĵoj.

La genia traduko de episkopo Sailer estas la plej bona kaj ŝatata germana eldono de la Imitado de Kristo. Kaj la bildoj de Führich ankoraŭ ĉiam estas kvazaŭ la muzikaj akordoj je la vortoj de eterna saĝo. La libron de Thomas a Kempis mem ni ja ne plu bezonas rekomendi. Ĝi devas esti en la posedo de ĉiu kristano.